


Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2012:4 (jul-aŭg)

American Esperantist

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2012:4 (Jul-Aug)



Ĉi-numere:

- Finnlandano trovas parencojn danke al Esperanto
- *Instruado*: learning and teaching at the same time
- Revenas *du jaroj kamerune*
- ...kaj multe pli!

Kelkaj el la bunte ilustritaj kartoj de *Dixit*, ludo kiu ĉefrolas ĉi-numere en nova rubriko (pĝ. 12)

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 51, No 4 — 2012:4 (jul-aŭg)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ bulteno@esperanto-usa.org

📍 Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto (American Esperantist) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.



Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere fuzu retroŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn al tiuj, kiuj sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Centra Oficejo • *Central Office*

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • *Direktoro, CO:* William B. HARRIS

Prezidanto • *President:* Orlando E. RAOLA

Vicprezidanto • *Vice President:* Philip G. DORCAS

Kasisto • *Treasurer:* Christopher ZERVIC

Aliaj estraranoj • *Other board members:* George

BAKER, Neil BLONSTEIN, Steven CYBULSKI, D. Gary GRADY,

Tor KINLOK, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING, Julie WINBERG,

Christine WINGROVE.

Korespondi deziras

Mi estas Oumar, juna komencanto el Senegal. Esperanto ne estas tre konata lingvo ĉe mi en Senegal, kaj mi laboras por disvastigi ĝin ĉi tie. En nia nacia asocio ni estas ses homoj kaj estas malfacile praktiki la lingvon ofte. Do, mi serĉas e-klubon por fratiĝi.

Oumar NDIAYE <omarasta@gmail.com>

Mi estas 17-jaraĝa studento kaj membro de la Junulara Esperanto Klubo de Shanthy, Sri-Lanko.

Shanika MADUWANTHEE
<info.shanthee2011@gmail.com>



Esperanto in social media

Many of us participate in social media. Lots of social media sites have an international reach. On such sites, it makes sense to have groups representing Esperanto.

I participate in a fitness and health site known as *My Fitness Pal*. I am still in the beginning stage of learning Esperanto, but for fun I created a forum group <<http://myfitnesspal.com/forums/show/3149>>. I would love to practice my Esperanto with others who have an interest in health and fitness. If you fit that description, please join me! Along the same lines, if you have created an Esperanto group on a social media site and are looking for participants, please share the details in an upcoming issue of *Usona Esperantisto*. I think that this is another great way to generate and continue interest in the international language as well as to share in our other interests at the same time.

— Sandy Duggan
<theduggans@castles.com>

Upcoming events

For a comprehensive list of upcoming events worldwide, see <<http://www.eventoj.hu>>.

June 25 – July 4 (Dallas)

NASK: La Nord-Amerika Somera Kursaro

This year the North American Summer Esperanto Institute (NASK) follows the *Landa Kongreso*—not only in the same city, but in the same building—so you can participate in both events with just one trip. Like last year, NASK now includes eight days of study; those arriving early for the *Landa Kongreso* will have 12 consecutive days in *Esperantujo*. For information on this year's instructors, program details, and fees, visit <<http://esperanto.org/nask>>.

September 28 – 30 (Enumclaw, WA)

Nord-Okcidenta Regiona

Esperanto-Kongreso

Enumclaw is located near Seattle next to Mt. Rainier, the focus of this year's NOREK. Events begin Friday with the *interkona vespero* and end at noon on Sunday. On Saturday we'll take a trip to Rainier National Park and on Sunday morning there will be presentations—the theme will be “Sustainable Energy for All” but we welcome talks on any topic. If you'd like to take part, contact Arlyn Kerr at <norek@morsekob.org>. The local group can help you get to the conference site if you travel to Seattle by ship, train, or plane; they can also provide lodging for several people before and after the convention. All are welcome—you don't have to be from the northwest to participate!



<http://esperanto-usa.org>

Contact addresses

Here are addresses for some of the larger local groups that meet semi-regularly. Please send updates to <bulteno@esperanto-usa.org>.

California

Los Angeles: <http://fizzylogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

Sacramento: <http://esperanto.org/us/esos>

San Diego: <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

San Francisco:
<http://esperanto.org/us/SFERO>

Santa Barbara: dorothyjeanh@gmail.com

Colorado (Longmont) <http://ek-ek.org>

Connecticut (Wallingford) <http://esne.net>

District of Columbia <http://esperantodc.org>

Florida <http://niasfero.blogspot.com>

Georgia (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

Hawaii (Honolulu)
<http://esperanto.org/us/Honolulu>

Idaho (Boise) <http://terpomuloj.org>

Illinois

Champaign-Urbana: <http://ekoci.org>

Chicago: <http://esperanto-chicago.org>

Maine (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

Massachusetts <http://esne.net>

Missouri (St. Louis)
<http://esperantostl.ning.com>

New Jersey (Princeton)
<http://esperanto-nj.tripod.com>

New York

New York: <http://esperanto-nyc.org>

Rochester: <http://esperanto.lodestone.org>

North Carolina (Raleigh Durham)
charles.o.mays@gmail.com

Texas

Austin: <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

Dallas: <http://esperanto-tx.org>

Virginia (Hampton Roads) <http://bonege.com>

Washington (Seattle)
<http://seattleesperanto.org>

Wisconsin (Madison)
<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

Pri preskaŭ ne elstara datreveno kaj aliaj etaj seniluziigoj

Pasintan decembron, grupo de E-aktivuloj kaj UEA-komitatanoj ektrumpetis la novan jubileon de la Internacia Lingvo: en 2012 ĝi fariĝas 125-jara. Tial oni devintus organizi aranĝojn, reklam-kampanjojn, TV- kaj radi-elsendojn, bankedojn, eldonaĵojn, ktp, liston senfinan. Dekomence, leginte la mesaĝojn, mi iom aŭtomate konsentis. Iom poste, la realo trafis min, kaj mi ekkonsciis, kiel malfacile estas trovi aktivulon kiu volas dediĉi multegajn horojn al jubileumado, kiom malfacile estas “vendi” la ideon, ke ni ja devas soleni okaze de la cent-dudekvina turniĝo de nia planedo ĉirkaŭ la suno depost kiam L. L. ZAMENHOF finfine sukcesis arigi la monrimedojn, kaj disponi sufiĉan liberan tempon por materiigi sian infan- kaj junaĝ-revon. Nu, min sorbis mia pangajna profesia laboro, kaj mia part-tempa okupiĝo pri miloj da aliaj aferoj, inkluzive gravan mil-onon kiu iel-alie rilatas al Esperanto kaj la koncernan jubileon mi preskaŭ forgesis.

Antaŭ kelkaj semajnoj, en mallonga interbabilado kun Esperanta veterano, homo kiu multflanke kaj dum longa tempo serioze kontribuis al antaŭeniĝo de Esperanto nialande kaj tutmonde, la temo de ĉi-jara jubileo ree levigis kaj mi ĝojige konstatis, ke la elstarulo samopinias pri la malbezono havi jubileajn aranĝojn ĉi-jare: kio estas speciala pri la numero 125? Kaj ni ambaŭ ride rimarkis, ke nenio estas aparte grava pri tiu ĉi numero. Nu, mi scias, ke kelkaj aliaj homoj ne dividis tiun ĉi opinion, ke ili taksis la jubileon grava ŝanco por pludiskonigi



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio. Vi povas kontakti lin per la adreso:

oraola@gmail.com

Esperanton, kaj pro tio ili decidis dediĉi fortojn kaj personan tempon al ĝi kaj kuraĝigi aliajn fari same. Tute bone. Finfine, mi ĉiam pledis, kaj daŭre pledas kaj pledos havi movadon sufiĉe malfermitan kaj adaptiĝeman, tiel ke ĉiu trovu en ĝi sian niĉon kaj kontente/kontentige kunlaboru por atingi niajn komunajn celojn. Ĝuste pro tio estas tute aprobinda kaj subteninda ideo, ke jubileumuloj festu la datrevenon. Tamen, kiam festado aŭ ajna alia agado postulas la laboron kaj engaĝiĝon de aliaj homoj, tiam oni riskas senton de fiasko aŭ seniluziigo, se la aluloj ne pretas aŭ volas “ensalti en nian vagonon”. Temas pri tute reala problemo, eĉ ofta, mi dirus, kaj kontraŭbatali ĝin oni povas per unusola rimedo: sekvi la Majstran admonon “Ni laboru kaj esperu.”

Nun mi cerbumas klopodante trovi ekzemplon de kiam mi estis sensukcesa proponanto, kaj sufiĉe facile mi povas ĝin trovi. Kiel menciite en antaŭa numero, mi multe volas instigi la esperantistojn havi altkvalitan kaj internacian radio-retejon. Persone, temas pri enamiĝo al la radio tiom aĝa kiom mi estas. Okaze de mia naskiĝo, mia avino donacis al mia patrino nederlandan radioaparaton kun mallongonda kapablo, kiun mi uzis ĉiu-

Esploroj pruvas: sakrantoj pli bone eltenas streson

Mi eliris el la aviadilo. Fine, post longa vojaĝo: Ĝibutio, lando de fontoj kaj dikvanganĝaj, ĉiam ridetantaj virinoj. Mi vagis ĉirkaŭ la urbo kaj renkontis bele-tan, ruĝe ĉapelitan junulinon. Mi dolĉege kaj ĝentile konversaciis, kaj ŝi timide ridis je mia ĉarmo kaj sprito. Ŝiaj dentoj ekbrilis kiel arĝentajaro en la mola ĝibutia sunlumo. Ŝi bleketis muse.

Atendu... kio? Ŝi *bleketis*?

Mi vekigis kaj aŭdis muson grati sian vojon trans la plankon. "Sankta Patrino de Dio!" mi oscedis, "mia kontraŭ-malaria medikamento donas strangajn sonĝojn... kie diable estas Ĝibutio?" Mi



Joshua MORRIS

Joshua dejoras en Kameruno por la usona Pac-Korpuso. Ĉi tie li dividas kun ni siajn ĉiutagajn spertojn.

joshxuo@gmail.com

malfermis mian tekokomputilon kaj serĉis Ĝibution en la enciklopedio *Encarta*: "...eta lando en nordorienta Afriko... la vetero estas varmega kaj seka tutjare... ne estas eĉ unu ĉiam fluanta rivero aŭ rivereto... ĝia dezerta, vulkana grundo estas unu el la malpli fekundaj de la mondo... malmulto de la lando estas plugebla... ĝi situas en tertrema zono."

tage dum preskaŭ tridek jaroj. Ankaŭ mia revo krei radioelsendon mi tre kontentige plenumis: inter 1988 kaj 1994 mi kunredaktis kaj produktis ĉiusemajnan duonhoran radioprogramon en Esperanto, atingeblan tiam per mallongaj ondoj tra la tuta mondo (nun ĝi estas havebla precipe per la reto). Do, mi senĝene konfesas, ke daŭre mankas al mi la radio en mia nova hejmlando! Post longa meditado kaj vide al la impona reta devastiĝo, aŭskultinte multe da (sufiĉe aĉaj) podkasto en iuj dialektoj distance rilataj al Esperanto, mi ekpaŝis por krei vere profesi-nivelan kaj esence internacian radioretejon en Esperanto. Mi trovis por ĝi nomon: *Tutmonda Radio-Reto en Esperanto* (TRRE), mi trovis kunlaboranton en Pollando, profesion radioproduktiston, mi kreis retan adreson por akcepti sinproponojn de aliaj kunlaborantoj, sed ĝis nun... nenio okazas.

Mi ankoraŭ ne rezignis pri la revo, daŭre pretas ĝin puŝi kaj paroli pri ĝi en ĉiuj forumoj (ankaŭ sur la paĝoj de *Usona Esperantisto*). Jen la ideo: simile al financado de Publika Radio ĉi-lande, TRRE estu subtenata de la aŭskultantoj. Ĝi fariĝu ĉefa distribuejo de bonkvalitaj (ne nur lingve, sed ankaŭ arte) programoj en Esperanto. Kompreneble, en la hodiaŭa mondo tiu ĉi agado okazu nur en la reto, kaj ankaŭ indas klarigi ke ĝi ne celas konkuri kun la naciaj elsendantoj, pro tio ke ĝia esenco estas internacieco, kaj eĉ parton de la tempo ĝi povus plu disaŭdigi materialojn kreitajn de aliaj radiostacioj (kuba, pola, vatikana, ktp). Nu, mi nun devas esperi, ke TRRE ne trafu la saman sorton de la 125-a jubileo en miaj manoj kaj ke iom post iom ni sukcesu arigi fortojn kaj veki intereson tiel ke finfine "ni atingu la celon en gloro". Estu tiel! ★

“Ho! Ejo malbenita de Dio. Tute ne tia, kia en mia sonĝo. Mi ĝojas, ke mi vekigis en Kameruno.”

Mi streĉis min. La mateno estis malvarma kaj mi sentis min bondormite feliĉa. Mi stumblis sur miaj disjetitaj libroj kaj vestoj survoje al la necesejo.

Mi rigardis tra la fenestro. Ĝi enkadrigis la lernejon de Ewoh, sur supro de monteto, kaj subite mi sentis min lacega. “Bonan matenon, lernejo...” mi sopiris, malĝoje. Tiam mi ridegis, iomete freneze.

“Patrino de dio!” Mi skuus la kapon. “Tiu medikamento konfuzas miajn pensojn!”

La vojo al la lernejo min kondukis tra “la centron” de Ewoh, la loko al kiu ĉiuj alvenas por sendi sian palmvinon al la regiona ĉefurbo, *Bamenda*. La marŝado, do, estis malrapida kaj ofte interrompita de mallongaj konversacioj, en kiuj ni diskutis tre evidentajn, eĉ videblajn aferojn.

“Ĉu vi iras al la lernejo?” unu homo demandis.

“Jes. Ĉu vi vendas palmvinon?”

“Jes. Venu kaj prenu tason. Ĝi purigos viajn okulojn kaj helpos vin instrui.” La homo rigardis min per okuloj tiel malklaraj, kiel malpura akvario kun mortinta fiŝo flosanta ĉe la supro.

“Jes, mi prenos, dankon.” Estus malĝentile nei.

Tiel mi faris mian vojon. Kiam mi atingis la lernejon sur la supro de la monteto, kaj eniris la ĉambron de mia kemioklaso, mi ŝvitis kaj spiradis kaj lernanto ridis kaj rimarkis, “Sinjoro, vi brilas!”

“Bone observite”, mi diris, ne ride-tante, “eble vi estos sciencisto malgraŭ

ĉio. Nun, traduku vian observon en la francan, tiam tajpu ĝin per komputilo kaj montru ĝin al mi.” Mi estas ankaŭ instruisto de la franca kaj komputilscienco.

“Sinjoro...” ŝi diris, timide.

“*Tu brilles!*” tradukis alia, pli kuraĝa lernanto.

“*Oui!*” Mi diris france, “*Comme le soleil! Très bien, petit garçon, mais n'oublie pas: il faut me vouvoyer. Je suis ton professeur, et j'exige du respect!*” (“Jes! Kiel la suno! Tre bone, knabeto. Sed, ne forgesu: vi devus min alparoli per la pli respekta vi-pronomo, *vous*. Mi estas via instruisto kaj mi postulas respekton!”)

Tiam mi laŭte frapis skribotablon per ligna bastono, kaj la lernantoj saltetis pro timo. La plejparto ne komprenis eĉ unu vorton de la franca. Ili nur komprenis, ke la freneza blankulo krias fremdlingve kaj frapas tablojn.

Mi min turnis al la nigra tabulo por kaŝi mian rideton. “Bone”, mi daŭrigis angle, “deprenu pecon da papero kaj skribu vian nomon, la vorton ‘kemio’, vian klasnumeron, kaj la daton. Hodiaŭ estas la sepa de Marto. Ĉi tio estas ekzameno, do, fermu la buŝon!”

Mi komencis skribi la unuan demandon sur la nigran tabulon. Ĵus kiam mi turnis min al la tabulo, la infanoj ek-murmuris. Mi parte returniĝis kaj strabis al ili. La murmurado ĉesis. Mi turniĝis denove al la tabulo. Ree murmurado. Mi turniĝis reen al la klaso kaj ekvidis lernanton kun moviĝanta buŝo.

“Brufaranta knabeto. Eliru.”

“Kiu? Mi?”

“Jes. Mi diris ‘fermu la buŝon’ kaj vi malbonkondukte rifuzas. Eliru tuj!”

“Sed sinjoro, mi ne parolis...”

“Vi daŭre malfermas la buŝon kaj mi ne aŭdas ion ajn aŭskultindan. Eliru tuj kaj ne plu malŝparu mian tempon!”

“Sinjoro, mi petas...”

“TUJ!”

Post tio la klaso kvietiĝis. Necesas nur fari ekzemplon.

“Numero unu”, mi skribis kaj legis laŭtvoĉe, “donu la tri statojn de materio.” Mi travagis la klasĉambbron, patrolanta kontraŭ trompado. Mi rigardis paperon: “Solida, likva, kaj gasa.” *Tre bone*, mi pensis. Mi rigardis alian: “saka, seĝa, kaj plastika.” *Dolĉa patrino de dio*, mi pensis. *Ĉu li eĉ estis ĉi tie kiam li estis ĉi tie?*

Ĝuste tiam, kiam mi miris pri la sensecaj respondoj, vespo enflugis la ĉambbron. (La fenestroj ne estas kovritaj de vitro). Ĝi petole ĉasis min tra la ĉambro, je la plezurego de la lernantoj.

“Restas ankoraŭ ekzameno! Ne zorgu pri la vespo!” mi kriis, forkurante.

Ili ridegis.

“Silentu!”

Dankinde, la vespo baldaŭ enuiĝis pri mi kaj reflugis eksteren.

“Numero du”, mi provis trankvile daŭrigi, “priskribu la ordon de eroj de...”

“Ah, Morris, pardonu min, mi petas...” la lernejestro staris en la pordo. “Aŭskultu bone, lernantoj: se mi legas vian nomon, stariĝu kaj foriru tuj. Vi neniam pagis vian lernejojpagon.” Li komencis legi nomojn kaj unu post alia la vokitaj lernantoj foriris.

“Ĉu ni povas daŭrigi?” mi ne certe petis al la malmultaj restantoj. “Bone. Priskribu la ordon de eroj de solidaĵo.” Mi denove vagis tra la ĉambro. Mi rimarkis odoron de fumo. “Ĉu ankaŭ vi flaras tion?” mi demandis la klason.

“Jes, sinjoro. La disciplinestro ordonis al kelkaj lernantoj ekbruligi amason da forĵetaĵoj.”

Dio! Pro kio!? Kial nun? mi pensis, vidante la fumaĉon eniri rekte en mian klasĉambbron. Baldaŭ la lernantoj plendis kaj tuis. Sed mi restis decida. “Numero tri...”

Je la fino mi ordonis: “Stariĝu kaj metu la manojn sur la kapon. Mi venas por kolekti la paperojn. Ne tuŝu ilin!”

La averto estis tiel vana, kiel se oni ordonus “ne pensu pri rozkolora elefanto...” Kompreneble, ili ĉiuj provis kaŝe redakti siajn paperojn.

Tiel la tago pasis. Mi donis kvin ekzamenojn tiaspecajn. Mi revenis hejmen lacege, portante grandan paperaron tra la centron de Ewoh.

“Vi estas reveninta?” iu demandis.

“Jes.” Evidente.

“Venu, prenu tason.”

“Dankon.” Estus malĝentile nei.

Tri litrojn poste mi iris hejmen kaj stumblis sur miaj disĵetitaj libroj kaj vestaĵoj survoje al la necesejo. “Bona Savinto, kiel mi vivas tiel?” mi sakris.

Mi rigardis tra la fenestro kaj vidis la lernejon. Mi skuis la kapon kaj sopiris lace, “Bonan nokton, lernejo.” Tiam mi ridis mallaŭte. *Mi scivolas, pri kio mi sonĝos ĉi nokte...* mi pensis, kiam mi estingis la lumon.

Endormiĝante, mi aŭdis muson gratiasian vojon trans la plankon. ★

[*Noto de la redaktisto:* Joshua petis min memori, ke liaj artikoloj prezentas nur liajn proprajn opiniojn, pensojn, kaj spertojn, kaj ili ne necese reprezentas vidpunktojn de la Pac-Korpuso mem.]

Genealogy via Esperanto: a success story

“Finn-sveda esperantistino kun parencoj kiuj enmigris al Usono antaŭ 100 jaroj, deziras korespondi kun usona esperantisto interesata de genealogio...”

After almost two years of study, I recently had my first opportunity to use Esperanto for a practical purpose. It happened when the fall issue of *Usona Esperantisto* showed up in my mailbox and a notice in the column *Korespondi deziras* caught my eye. A Swedish Esperantist was seeking help with a genealogy matter. She didn't feel that her command of English was strong enough to accomplish the research herself, and she was hoping to find an American Esperantist to help her navigate the available records.

I contacted Soile by email to volunteer my services. It turned out that she was now in her 70s, and most of her relatives—including her husband and only child—had already passed away. She was



Kristy Lommen

Kristy is an alumna of NASK and teaches an Esperanto class at her son's middle school in Auburn, Washington. She uses her genealogy research skills to document the Japanese community that

thrived in her hometown prior to internment during World War II. Their stories can be found on her website, AuburnPioneerCemetery.net.

klommen@msn.com

hungering for new family connections. Unfortunately, her grandmother was one of only two siblings who stayed behind in Finland when the family's other five children departed for America in the very early days of the 20th century. She knew the names and birthdates of these five ancestors, and she knew that they had probably settled down in Minnesota initially. (No surprise there!) She was hoping to contact their descendants—



At left: a photo from 1958 in the Gothenburg harbor, where Soile and her mother bid farewell to her cousin Carl of Minneapolis, returning to the USA by ship. At right: Soile in 2012.

her distant American cousins—and perhaps establish relationships with them. But she had no idea of the names or locations for the present generation. She wanted to know if, in a country as big as America, there was any way to track down her lost family. Did I think I could help?

What seemed like an insurmountable problem to Soile actually seemed pretty straightforward to me. In fact, if I couldn't track down at least some of her family members, I wasn't sure that I could continue to call myself even an amateur genealogist.

I assured Soile that I would give it my best shot. She provided me with the names and birthdates for the original generation and I began my research.

A week later I initiated an email exchange with a woman in San Diego who, it turned out, was the great-granddaughter of one of the brothers on Soile's list. As you might expect, she was originally reluctant to share personal family information with me, a complete stranger. She asked for an explanation of who I was and why I was involved. I explained that Soile did not speak much English, but was a very fluent Esperantist and that, as both an Esperantist and genealogist, I had volunteered to help her make contact with her American relatives.

My new San Diego contact responded with a single word: "Fascinating." I imagined her typing it with a skeptical Dr. Spock-type expression, complete with arched eyebrow.

Fortunately, she warmed up as we exchanged messages over the next few

days. With her help, I was able to provide Soile with three email addresses for various American cousins. In addition to the woman in San Diego, we also found descendants in southern Oregon and Kansas. The whole exchange took about ten days.

As of today, Soile has "friended" several of her American relatives on Facebook. They use Google Translate to bridge the gap between her Swedish and their English. And I get the satisfaction of having accomplished something that, had it not been for Esperanto, might never have happened. ★

Temo: Saluton!

De: Soile Lingman

Al: Kristy Lommen

Dato: 22 Apr 2012

Kara Kristy,

Dank' al vi, Usona Esperantisto kaj la UEA-delegito en Portland mi ricevis kontakton kun miaj parencoj en Oregon, Minnesota, Florida kaj Francujo. Mi tre ĝojas pri tio kaj dankas vin pro la helpo. Mi ja serĉis kontaktojn dum multaj jaroj kaj jam malesperis pri la ebleco trovi ilin...

Bone se Usona Esperantisto publikigas ion pri ĉi tiu mirinda afero, kiel mi ricevis kontakton post tiom da jaroj kun miaj parencoj kies geavoj forlasis la hejmlandon Finnlando antaŭ pli ol 100 jaroj.

Amike salutas,
Soile Lingman

Is it possible to learn and teach Esperanto at the same time?

When Russian composer Nikolai Rimsky-Korsakov was a young professor at the Saint Petersburg Conservatory he had to teach his students music theory, which at the time he knew nothing about, having written orchestrations based on intuition. But he managed to pull it off by staying a few weeks ahead of the students. I'm sure plenty of other teachers have had to do something similar in other subjects, and I suspect how successful they are depends a great deal on the subject and on the teacher's background. A history teacher tasked to teach an unfamiliar bit of history is in a different position from a history teacher asked to teach advanced calculus.

What about teaching languages? I know of cases in which language teachers have had to teach an unfamiliar language and managed to do it, but what about a teacher who has never taught a foreign language? Is that possible? The question is about to be put to the test in some Australian elementary schools.

This is interesting news in itself, but if it proves successful, the same approach and some of the materials might be adaptable for local groups, college Esperanto clubs, and other places where experienced Esperanto teachers—or even fluent speakers—are unavailable.

Australian educators often refer to foreign languages as *LOTE*: Languages Other Than English. *LOTE* programs in Australian schools have not historically been very successful (something true of many other countries as well). In 1996 the Australian Languages and Literacy Council reported that “the key finding of



D. Gary GRADY

Gary is editor of the bulletin of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgarygrady@frontier.com

the council's investigation is that our education systems are consistently failing to deliver any worthwhile proficiency in languages.” Primary schools in particular have been dependent on specialist teachers, who are in short supply.

Penelope “Penny” Vos has experimented for some years with teaching Esperanto to her students and has seen a degree of success even when the time devoted is as little as 40–60 minutes per week. Under better circumstances, primary school students might spend 100–200 minutes a week over three years studying a foreign language, a total of about 200–400 hours. It's been estimated that an English-speaking adult can learn French or German in about 700 hours, with Japanese taking several times as long, while a comparable level of competence in Esperanto could require around 100 hours. Even granted that children and adults learn at different rates, Esperanto would seem to be a better fit with the instructional time available.

There remains the problem of finding teachers. Qualified, professional Esperanto teachers are in even shorter supply than teachers of many other languages. On the other hand, there is no shortage of primary school teachers in Australia.

According to Alan J. Bishop, a now-retired professor of education at Monash

University near Melbourne, “the EKPA-ROLI project which we undertook at Monash University in 1994–6 showed that not only was it possible for non-specialist elementary teachers to teach Esperanto, but that their students quickly learnt the basic elements of the language. Moreover it was striking how much better their attitudes were to learning a language compared to those students who had been struggling with other languages. The secondary schools to which they went were greatly impressed with their positive attitudes.”

(Coincidentally, Monash is the only Australian university I’ve ever visited, back in 1986. My favorite thing about it was an on-campus eatery called “Milliways, the Restaurant at the End of the University,” which will amuse you if you’re familiar with *The Hitchhiker’s Guide to the Galaxy*.)

Several years ago Vos, with the help of a number of colleagues, set out to produce a set of training materials for use by teachers who could not yet speak Esperanto themselves. A kit called *Talking to the Whole Wide World* is now available that includes colorful instructional materials including jokes, games, and songs, a PowerPoint presentation for parents, an audio CD to teach pronunciation, and access to other materials including the video course *Mazi en Gondolando*. Besides Esperanto itself, the course encourages children to learn about other cultures by helping connect Australian classrooms with students in other countries. The course is being promoted by the Asia Literacy Teachers Association, among others.

“In the first year,” Vos says of the learn-as-you-teach approach, “the class gets to share the learning adventure with the teacher, and see that everyone needs to practice, look things up, make mistakes... this is important learning. After the first year, the teacher is probably in the more usual position of being ahead of the class and is increasingly well equipped to provide ‘language immersion’ experiences for the class.” (That’s a good point: The teacher is only a beginner once.)

In addition, teachers will soon be able to take a two-week intensive course at the University of the Sunshine Coast in southeastern Queensland. As Vos describes it in a presentation you can view online, teachers who take the course “will experience the lessons and learning activities of *Talking to the Whole Wide World*, which you will then be able to teach and lead so that your students need never leave your care monolingual. The set of LOTE methodology skills that you will learn has been positively reviewed by such highly-respected experts on language education as Professors Michael Clyne and Joseph Lo Bianco. They include intercultural exploration, linguistic explanation, use of songs, stories, poems, jokes, Internet resources, Skype, email, competitions, videos, an extensive range of learning games, and consolidation exercises. It is a serious course, in that it seriously results in language mastery, but it is designed to engage and I bet that you’ll enjoy both the learning and the teaching.”

You can read more about the project at <<http://mondeto.com>>. ★

Dixit: socia kartludo

Dixit (latine “ŝ/li diris”) estas populara socia kartludo por tri ĝis ses homoj kun belaj kartoj, kiuj montras diversajn kuriozajn pentraĵojn. La kerno de la ludado konsistas el provoj priskribi la arton per amuzaj, ambiguaj, kaj eventuale poeziaj diraĵoj. La kartoj mem estas sentekstaj, do per la samaj kartoj konvene eblas ludi en iu ajn lingvo. La ludo origine estas franca sed vendiĝas kun instrukcioj en pluraj lingvoj. Jam aperis du aldonaj *Dixit 2* kaj *Dixit Odyssey* kun pliaj kartoj.

Mi jam ludis ĝin plurfoje, diversloke kun diverslandaj esperantistoj. Ĝi amuzas kun spertaj esperantistoj kaj ankaŭ bone funkcias kiel lernilo kun komen-cantoj.

Mi aparte ĝuas ludi ĝin kun esperantistoj. Kiam nacilingvaj grupoj ludas, ofte estas aludoj al komunaj naciaj kultu-raĵoj – ekzemple popularaj filmoj, tele-vidserioj, muziko, ktp. Tial mi ŝatas ludi Dixit-on kun esperantistoj de malsamaj



Russ WILLIAMS

Antaŭe de Aŭstino, Teksaso, Russ nun loĝas en Vroclavo, Polujo kun sia edzino Anna SKUDLARSKA. Ili esperantumas kaj tabulludas obsede.

cxiomortas@gmail.com

landoj, ĉar ni havas komunan lingvon sed ne havas komunan nacian kulturon, do la “rakontoj” estas alispecaj ol kiam samlandanoj ludas nacilingve.

Do kiel la ludo funkcias? Unu ludanto (la “rakontisto”) elektas unu el siaj ses kaŝitaj kartoj kaj metas ĝin, kun la bildo nevidebla, sur la tablon kaj priskribas ĝin per mallonga rakonto, citaĵo, aludo, ŝerco, bleko, gesto, ktp. Ekzemple, la rakontisto povus diri simple la vorton “Amo” aŭ kantaĉi “En la mondon venos nova glubendo...” aŭ demandi “Kion havas komune la romanoj *Ŝtona Urbo* kaj *Litomiŝla Tombejo*?” aŭ diri ion ajn. (Ofte pli amuzas kaj interesas, se oni parolas iom pli longe anstataŭ diri nur unu vorton aŭ frazon.) La rakontisto

Eble eĉ pli ol aliaj homoj, esperantistoj ŝatas ludojn: tabulludojn, parolajn ludojn, rolludojn, vortludojn... kaj pli!

Ĉi-numere debutas nova rubriko speciale pri ludoj. La celoj estas enkonduki ludojn eble nekonatajn al vi, helpi vin trovi novajn ludojn por plivigliĝi vian kurson aŭ lokan grupon... kaj eĉ, eble, instigi vin al ludkreado!

Kompreneble la fokuso estu Esperanto, do artikoloj prefere traktu ne pure ciferajn aŭ logikajn ludojn, sed tiajn, kiaj postulas, utiligas aŭ iel plibonigas lingvoscion.

Pli precize, mi serĉas artikolojn tiajn:

- ★ recenzoj aŭ priskriboj de lingvaj ludoj – aŭ originale en Esperanto, aŭ adaptitaj al Esperanto
- ★ raportoj pri viaj spertoj – ĉu sukcesaj aŭ ne – utiligi ludojn en instruado aŭ en kunvenoj
- ★ diskutoj pri la arto de ludfarado kaj esperantigo de ailingvaj ludoj – kiajn defiojn kaj eblojn prezentas Esperanto tiurilate?

Ludeme via,

— *La redaktisto*

celas, per lerta (kaj espereble interesa kaj amuza) diraĵo, rekonigi sian karton al *iu* sed ne al *ĉiuj* el la aliaj ludantoj. Do la priskribo ne estu tro evidenta (ekz., “Mia karto montras infanon kaj urson, kiuj staras dors-al-dorse, kun ruĝa fono”) nek tro malspecifa (ekz., “Aĵo”).

Sekve ĉiu alia ludanto elektas unu el siaj propraj ses kaŝitaj kartoj, kiu plej taŭge kongruas kun la diraĵo, kaj aldonas ĝin al la karto metita de la rakontisto.

Sekve ĉiuj kartoj (po unu de ĉiu ludanto) estas miksitaj kaj poste malkaŝitaj en vico, kaj ĉiu ludanto (krom la rakontisto mem) klopodas decidi, kiu el ili estas la karto de la rakontisto. Oni indikas, kiun karton oni elektas per ĵetono kun numero de unu ĝis ses; samtempe ĉiuj montras sian elektitan ĵetonon.

Ekzemple en ludo kun ses homoj, Alfredo, la rakontisto, diras, “Mi solvos tiun problemon iam, sed ne hodiaŭ” kaj metas sian elektitan karton tablomezen (kun la bildo nevidebla al la aliaj ludantoj). Tiam ĉiu el la kvin aliaj homoj elektas sian plej kongruan karton kaj aldonas. La rakontisto miksas kaj malkaŝas la kartojn:



Kiun karton metis la rakontisto? Jen la dilemo.

Se *iu* sed ne *ĉiuj* ludantoj sukcese divenas la veran karton de la rakontisto, ili kaj la rakontisto mem gajnas tri poentojn. Sed se *neniuj* aŭ *ĉiuj* divenas la veran karton, la diraĵo estis tro obskura aŭ tro facila kaj la rakontisto do perdas du poentojn.

Dume, ĉiu alia ludanto kies karto allogis voĉdonon ricevas poentojn por ĉiu ĵetono allogita de tiu karto.

Do la sistemo bone kuraĝigas ludantojn meti sian karton plej taŭgan al la diraĵo de la rakontisto.

Por daŭrigi la ekzemplon: supozu, ke du homoj voĉdonas por la kvina karto (kun labirinto), du por la tria karto (kun heliko ĉe fundo de alta ŝtuparo) kaj unu por la sesa karto (kun malliberulo). (Alfredo mem ne metas ĵetonon, ĉar la rakontisto kompreneble scias sian propran karton.)

Nun Alfredo informas, ke la kvina karto (labirinto) ja estis la vera karto. La du homoj (Bernardo kaj Marta) kiuj prave elektis tiun karton ricevas po tri poentojn kaj ankaŭ Alfredo gajnas tri poentojn pro sia sukcesa diraĵo. Dume la tria karto estis de Bernardo, kiu ricevas aldonajn du poentojn ĉar li allogis du ĵetonojn al sia karto, kaj la sesa karto estas de Johano, kiu ricevas unu poenton.

Ĉiuj prenas po unu novan karton por komenci la sekvan rakonton, kaj la sekva ludanto post Alfredo fariĝas la rakontisto. Tiel la ludado daŭras ĝis la kartaro estas elĉerpita. Tiu gajnas, kiu havas la plej multajn poentojn en la fino...

...sed Dixit ne vere estas tre serioza konkureca ludo. Ĝi estas pli amuza, so-



Pitsburgano Jessica GRASSO (dua de maldekstre) ludas Dixit-on ĉe IJK en Ukrainujo, 2011.

cia, paroliga. Se oni ludas ĝin tre konkureme kaj strategie, oni povus intence diri diraĵojn, kiun nur unu alia ludanto povus kompreni – ekzemple aludo al evento, kiun nur ili du partoprenis. Sed tia ludmaniero iel ŝajnas kontraŭ la spirito de la ludo, laŭ multaj Dixit-emuloj. Al homo, kiu ĝuas ludi nur seriozajn strategiajn ludojn, eble Dixit ne multe plaĉos. Tamen laŭ mi, Dixit funkcias konkurence multe pli kontentige ol iom similaj famaj ludoj kiel *Apples to Apples*, kaj do ankaŭ seriozaj ludemuloj pli ofte ĝuas ĝin ol multajn “sociajn/festajn” ludojn.

La diskutoj kaj klarigoj kaj moko post poentado pri la diraĵoj kaj la kartoĵoj ofte amuzas:

“Kion vi pensis per tiu karto kun tiu diraĵo?”

“Ĉu vi ne vidas? Mi menciis doktoron Zamenhof, kiu portis okulvitrojn, kaj ankaŭ la ulo sur la karto portas okulvitrojn! Estas tute evidente!”

“Vi frenezas! Neniu elpensus tion!”

“Sed tio pli sencas ol via karto, kiun ĉiuj mise elektis! Nur ĉar estas barbo!?”

Ridado sekvas... kaj poste la sekva rakonto... kaj eventuale dua partio. ★

Eldona jaro: 2008. Aŭtoro: Jean-Louis ROUBIRA. Artisto: Marie CARDOUAT. Eldonejo: Asmodee.

Venas bulteno pli facile dividebla en sociaj retoj

Dum la pasinta jaro okazis diskuto en tiuj ĉi paĝoj pri la estonteco de la bulteno, surbaze de propono de la prezidanto en n-ro 2011:5. Li volis ke *Usona Esperantisto* fariĝu ĉefe elektronika gazeto, pli facile legebla en la Tut-Tera Teksaĵo.

Konfese, la ideo ne unue ŝajnis al mi facile efektigebla. Komposti TTT-dokumenton ege malsimilas al kutima (papera) kompostlaboro; por krei ambaŭ versiojn oni devas fari la saman temporaban laboron dufoje. Tial ni nun eldonas la bultenon per PDF-dosiero, kiu konvenas ne nur por presado, sed ankaŭ en diversaj komputiloj – inkluzive de la lastatempe furoraj “poŝlegiloj”. Tamen PDF ne multe oportunas en la mondo de sociaj retejoj (ekz. *Facebook*, *Google+*, *Reddit*, ktp.) kie pli kaj pli multaj esperantistoj (kaj eventualaj novaj membroj de E-USA) estas aktivaj.

Dum la pasintaj monatoj mi multe cerbumis pri la prezidanta propono, esplorante diversajn eblojn. Ĉu eblas krei ĉefe retpaĝan gazeton el kiu mi povus havigi sufiĉe belan presitan version – sen tute refari la saman, malfacilan kompostlaboron? Ĝis lastatempe, la respondo restis “ne”.

Tamen danke al la plej nova versio de la reta marklingvo HTML – kiun nun subtenas preskaŭ ĉiuj TTT-legiloj – eblas fari multe pli detalan kompostadon ol antaŭe. Kun iom da zorgo, eblas per ĝi krei retpaĝojn kiuj, kiam presitaj, plimalpli kaptas la grafikajn trajtojn de nia papera bulteno. La presita rezulto ne estas *tute* samaspekta kiel la nuna bulteno, tamen ĝi espereble ne tro ĝenos



Hoss FIROOZNIA

Hoss redaktas la gazeton en sia hejmurbo de Roĉestro, NY. Lia rubriko ne reprezentas la vidpunktojn de la estraro; pri siaj opinioj kulpas nur li mem!

hoss@lodestone.org

tiujn legantojn, kiuj preferas paperon.

Do... baldaŭ komenciĝos nova eldona eksperimento! Ekde la venonta numero 2012:5 (sep–okt) nia bulteno aperos TTT-e ĉe la retejo esperanto-usa.org, kie membroj povos legi la plej freŝajn artikolojn tuj kiam ili aperas – eĉ antaŭ la oficiala eldondato!

Legantoj kiuj preferas paperon daŭre ricevos paperan bultenon, same kiel nun. Nenio vere ŝanĝiĝos pri la papera versio krom la formato: anstataŭ la ĝisnunan kajeron de grandeco “A5”, oni ricevos faskon da folioj de grandeco “Letter”.

Same kiel nun, nur membroj rajtos tralegi la plej freŝan numeron. Kiam oni vizitos TTT-paĝon de la plej freŝa numero, la retejo petos retpoŝtadreson kaj poŝtkodon por konfirmi membrecon. (Necesas entajpi tiun informon nur unufoje, kaj poste via TTT-legilo faros ĝin por vi tute aŭtomate.) Kompreneble, ĉiuj numeroj krom la plej freŝa restos legeblaj por ĉiuj – ĉu membroj aŭ ne.

Por faciligi disdividon de artikoloj, nia retejo permesos aliron al la plej freŝaj artikoloj *eĉ por nemembroj*, kondiĉe ke ili atingas la artikolojn per ligiloj afiŝitaj en sociaj retoj. Ekzemple: se vi, kiel membro, volas dividi novan artikolon kun viaj amikoj en *Facebook*, vi simple afiŝu ligi-

lon tie al la artikolo. Nemembroj kiuj sekvos la ligilon povos legi la artikolon; ili tamen ricevos ankaŭ etan “reklamon” ĉekape de la paĝo por memoriĝi ilin, ke Esperanto-USA bezonas ilian subtenon!

Baldaŭ mi aldonos novajn kapablojn: serĉilon, indeksojn, afiŝbutonojn, ktp. Mi ankaŭ volas ampleksigi la retejon per aldonado de vere malnovaj numeroj – ĉiuj numeroj ekde la fondiĝo de ELNA, se eble. Por realigi tiun celon, tamen, mi bezonas vian helpon. Danke al niaj sindonaj membroj Ellen EDDY kaj Mary HAMMERSMITH, mi jam enskanis multajn malnovajn numerojn, tamen ankoraŭ restas grandaj breĉoj. Se vi havas propran arĥivon kiun vi volus oferi al skanado (mi ne povos resendi numerojn, bedaŭrinde), bonvolu kontakti min. Iam mi bezonas ankaŭ volontulojn por provlegi enskanitajn tekstojn kaj elsarki erarojn. Pli pri tio en venonta artikolo! ★

Senintencaj esperantajoj?



Vidis tiun ĉi restoracion nia observema leganto Andreo ROSENBAUM... dum li umis en Hartford, Connecticut.



Ni finu la numeron per foto de tiu ĉi nova kafejo en Roĉestro, Novjorkio.

Enigmo-solvo de n-ro 2012:2

K	O	K		A	M	E	M	A		S	U	R
A	B	I		K	A	N	A	L		A	S	O
F	L	U	I	S	S	U	R	L	I	P	O	J
		M	N	O		A	G	O	N			
T	K	E	K			A	G	A		D	I	S
A	L	T	O		F	E	R	A		O	L	E
V	E	I		S	E	D	E	N		L	E	D
O	R	O		T	R	U	T		M	O	K	I
L	A	N	D	A	N				U	R	S	O
				I	G	A	S		A	Ĝ	O	
B	U	S	O	N	N	E	T	R	A	F	I	S
O	N	O		A	D	R	E	S		O	D	O
T	I	K		S	O	B	R	E		R	O	N

Gratulon al nia ĉi-foja gajninto, **Ellen Eddy!**

Dankon kaj laŭrojn al ankaŭ Arnold VICTOR, Vilĉjo HARMON, Jessica GRASSO, Daĉjo RUTAN, Walter MURAWSKI, Olga DU TEMPLE, Peter MCCORQUODALE, Keneĉjo GOLDBERGO, Cornelius J. MCKOWN, Walter MURAWSKI, E. James LIEBERMAN, kaj Arlyn KERR.

La enigmo-konkurso revenos en la venonta numero.